

Eŭropa mona konvencio

Claude Gacond, 118-a radioprelego, 1966.01.05 & 1966.01.09

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond pri interesa propono por eŭropa mona konvencio.

Miaj funkcioj en internaciaj medioj donas al mi interesajn eblojn kontakti personojn aŭ movadojn, kiuj laboras al progreso de la monda unuiĝo.

Tiujn lastajn monatojn mi konatiĝis kun tre interesa propono por Eŭropa Mona Konvencio. Ĝin faris franca organizaĵo nomata **Cercle d'études Lamennais**, kies centro troviĝas en Parizo kaj kies sekretario sin kaŝas en provinca loko Dol-de-Bretagne.

Mi povis konatiĝi perletere kun tiu sekretario, sinjoro Maurice Gelly, apotekisto, kiu verŝajne dediĉas liberan tempon al tiu kaŭzo, kiel ni esperantistoj dediĉas niajn feriojn al la kaŭzo de interlingvo.

Kiel vi konstatos, la proponoj de tiu Stud-rondo Lamennais ne povas nin lasi indiferentaj. Se ĝi efektiviĝus, ĝi ebligus la realigon de multaj el niaj sopiroj en la kampo de la internaciaj interŝanĝoj.

Neniam oni tiom parolis pri monaj reformoj, ol dum la pasinta jaro. Ni ankoraŭ havas en la memoro la krizon de la brita pundo. Vi scias, ke la usona dolaro ekŝanceliĝis kaj ke Generalo De Gaulle proponis reveni al la mortanta ora mezurilo, ĉar la oraj rezervaĵoj en Francio kontentige kreskadis, dum en Usono kaj Britlando ili iom tro rapide elĉerpiĝis.

En la internaciaj medioj oni proponas projektojn pri kreado de UN-mono. En Esperantujo la uzo de la Stelo teorie disvastiĝas kaj faciligas la kongresajn diskutojn.

Ne nur fundamentaj naciaj monoj konas malfacilaĵojn. Nia eta lando Svislando, kiu povis fieri pri la firmeco de sia mono, subite komprenis, ke la svisa franko ne plu profitas pri apartaj cirkonstancoj kaj, kiel la aliaj najbaraj monoj, trankvile sed sisteme devalutiĝas.

En la internacia merkato certe mankas mon-unuo. La mono de la ekonomie plej fortaj landoj provis sin trudi kiel internacian monon, sed ŝajnas, ke ili nun ne plu povas sufiĉe forte garantii la kurzon de sia mono, kaj ke pro tio registaroj provas alian mon-mezurilon por garantii siajn reciprokajn interŝanĝojn. La svisa registaro devis peti al kelkaj landoj ne uzi la svisan monon por tiuj aranĝoj.

En la mona anarkio aŭdiĝas multaj profetaj voĉoj, kiuj promesas plej diversajn rimedojn. Kiam oni kritike ekzamenas tiujn rimedojn, tiam oni fariĝas dubema pri la seriozeco de iliaj proponintoj. Tamen kelkaj proponoj valoras atentan trastudon. Dum tri elsendoj mi provos informadi vin pri tiu, kiu ŝajnas al mi la plej interesa, por ke vi povu ĝin mediti, kaj kial ne, diskuti pri ĝi en la lokaj kluboj kaj societaj informiloj. Do bone aŭskultu, eĉ se la financaj terminoj estas fremdaj al viaj radikaj konoj.

La Stud-rondo Lamennais sin direktas al Eŭropa Ekonomia Komunumo, sed ĝia propono havas vere universalan karakteron. Pro tio ĝi ne nur estos aŭdata en EEK-medioj, sed en ĉiuj medioj, kiuj sentas la bezonon alporti iom da ordo en la monda financa malordego.

Jen la principoj de tiu propono de la Stud-rondo Lamennais : La ses landoj de Eŭropa Ekonomia Komunumo (EEK) akordiĝu por krei novan internacian institucion, kies proponata titolo estus **Eŭropa Kompens-Oficejo**. Tiu institucio funkcius kiel poŝtĉekkonta centro, kiu neniam ricevus mon-deponaĵojn.

Ĝia funkcio konsistus ekskluzive je la enskribo de kreditigo por la kontoj de la eksportistoj kaj je la elskribo de debitigo por la kontoj de la importistoj. Ĉiuj mon-operacioj transirantaj

Eŭropa mona konvencio
Claude Gacond, 118-a radioprelego, 1966.01.05 & 1966.01.09

landlimon devus esti speze notitaj en tiu oficejo, ĉu ili estas finance videblaj aŭ nevideblaj. Ni pensu al la turismo, transportaj pagoj, asekuroj, ktp, kaj ne nur al la var-interŝanĝoj.

Samtempe tiu Eŭropa Kompens-Oficejo difinus **spez-unuon** supernacian. La Stud-rondo Lamennais proponas la nomon **Europa** por tiu unuo. Ĝi estus vera mona metro, tiom strikte difinita, kiom estas la linia metro. Do ĝi estus nevaria.

Tiu kvalito implikis, ke la naciaj monoj akceptus ne plu valori ekster la nacia limo kaj alpariĝus al tiu spez-unuo Europa. Mi klarigas tion : ekzemple dum konsentigita periodo ĉiu spez-unuo Europa reprezentus nevarieblan nombron da monaj unuoj, 5 frankojn en Francio, 4 markojn en Germanio, 562 lirojn en Italio, ktp.

Ekster tiu Eŭropa Ekonomia Komunumo la monoj devus ankaŭ alpariĝi al la spez-unuo Europa. Ĝi valorus 1 dolaron en Usono, 1 rublon en Sovetio, ktp. Tiuj valoroj devus esti taŭge studitaj.

Kaj nun ni ekzamenu, kiel oni uzus tiun poŝtĉekkontan oficejon de la Eŭropa Kompens-Oficejo de Eŭropa Ekonomia Komunumo.

Unue oni bone komprenu, ke spez-unuo Europa naskas nenian monon, eĉ ne skribomonon, ĉar ĝi permesas nenian transmetadon.

Ni prenu konkretan ekzemplon : Franca produktisto eksportas al Germanio varojn, kies prezoj valorus 200 spez-unuojn Europa, jen kiel okazus la financa transakcio : La germana importisto pagus 800 markojn al Bundesbank (la valoron por 200 spez-unuoj Europa.) La Bundesbank petus al Eŭropa Kompens-oficejo (EKO) debiti el ĝia konto 200 spez-unuojn Europa kaj krediti tiun de Banque de France per la sama sumo. Avizita pri tiu kredita enskribo kaj pri ĝia motivo Banque de France verŝus al la franca eksportisto la kontraŭ-valoron de la 200 spez-unuoj Europa en franca mono, tio estas 10'000 frankoj. Do nenia mono estus elirinta Germanion kaj enirinta Francion, temus pri nuraj avertoj inter centraj bankoj. En ĉiu lando nur ekzistus unu Centra Banko rolanta kiel oficejo por la konto de Eŭropa Kompens-Oficejo.

Dum la du venontaj elsendoj ni donos aliajn klarigojn pri tiu interesa propono de la Stud-rondo Lamennais. Ĝia sekretario promesis sendon de informilo al la interesatoj. Do skribu al nia radio por ĝin ricevi.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-